

Unesko-Kuriero aperos en Esperanto

■ **Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio)**

Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi ekaperis en 1946. Kiel grava komunikilo por disvastigi la ideojn de Unesko kaj promocii la interkulturajn dialogojn, la revuo iam ludis gvidan rolon por disvolvi la misiojn de la internacia organizaĵo en la kampoj pri kiuj ĝi respondecas.

Dum la pasintaj jardekoj multaj esperantistoj alvokis ke Unesko eldonu la revuon *Unesko-Kuriero* ankaŭ en Esperanto. La konata aktivulo S-ano Mario Fonseca alvokis por inundi Uneskon per petoj, ke Unesko komencu eldoni ĝin ankaŭ en Esperanto. Laŭ lia alvoko esperantistoj sendinte al Unesko amason da retaj mesaĝoj, ĝenis la funkciulojn de Unesko, kiu multfoje plendis al UEA pri proponoj de individuaj esperantistoj pri oficialigo de Esperanto, ĝia instruado, eldonado de Esperanta versio de *Unesko-kuriero*. En la jaro 2000, laŭ la postulo de Unesko, tiam ĝenerala direktoro rete publikigis malferman leteron por haltigi la agadon. En la malferma letero Osmo skribis: *"Dum la pasintaj jardekoj UEA jam plurfoje diskutis pri la sama ideo kun respondeculoj de Unesko. Kvankam ŝanĝiĝis la respondeculoj, la respondo restis la sama: se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de Unesko-Kuriero."* (el *Eventoj*, n-ro 182, 2/marto-2000.)

Post lia alvoko oni ĉesis la mesaĝan bombadon al Unesko. Multaj esperantistoj

konsciis ke la Esperanta *Unesko-Kuriero* estus ege valora revuo, per kiu ni povus montri al la mondo ke Unesko subtenas Esperanton. Bedaŭrinde la Kuriero devige ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj. Ekde tiam malaperis la penado ĉe nia esperantistaro.

La 17-an de oktobro 2016, la ĉina registaro subskribis memorandon de kunlaboro kun Unesko por financi la denovan publikigon de la *Unesko-Kuriero* per 5.6 milionoj da usonaj dolaroj. La 12-an de majo 2017, la 1-a numero (aprilo-junia) de la trimonata revuo eldoniĝis en la ĉina, angla kaj franca lingvoj kun aparte po 76 paĝoj. Tamen malaperis la iama aktivulo s-ano Mario Fonseca. Rete troveblas nur la alvoko de Osmo Buller, tiam Ĝenerala Direktoro de CO de UEA, aperinta en la jaro 2000. Ĉu ni daŭre jetos la mesaĝajn bombojn al Unesko aŭ kunlaboros por eldoni ĝin en Esperanto?

Nova espero videblas en la anonco "UEA serĉas tradukistojn kaj provlegantojn por Unesko-Kuriero" el la *Gazetaraj Komunikoj* n-ro 684, fare de UEA la 23-an de majo. Laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, pretiĝas eksperimenta eldono de la *Kuriero* en Esperanto. La teknika laboro okazos en Ĉinio, sed pri la tradukado kaj redaktado kunlaboros homoj el diversaj landoj. Post la anonco, pli ol 30 esperantistoj el 22 landoj partoprenis en la tradukado kaj provlegado. Kortuŝe!



Dank' al internacia kunlaboro, kaj financa kontribuo de Esperanto-Centro Ora Ponto (Ĉinio), la 1-a numero de *Unesko-Kuriero* en Esperanto baldaŭ eldoniĝos.

Nun ĉiuj tradukistoj kaj provlegistoj laboras senpage. Por daŭrigi la eldonadon, ni devas finfine pagi la tradukan kaj provlegan laboradon. Nur tiel la eldonado povos esti daŭripova. Tiu kiu ne havas tempon traduki aŭ provlegi, povus kontribui per mondonaco, aŭ reklamo en reklama paĝo de la *Kuriero*.

UEA serĉas tradukistojn kaj provlegantojn por *Unesko-Kuriero*

Post kelkjara paŭzo pro financaj malfacilaĵoj, la fama revuo de Unesko reaperas kadre de interkonsento inter la ĉina registaro kaj la Organizaĵo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo. Ekde nun ĝi eldoniĝos kvarfoje jare en la ĉina, angla kaj franca lingvoj, sed Unesko ankaŭ libere permesas alilingvajn eldonojn, se oni trovas por tio la financajn rimedojn.

Laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, pretiĝas eksperimenta eldono de la *Kuriero* en Esperanto. Same kiel por la alilingvaj eldonoj, la teknika laboro okazos en Ĉinio, sed pri la tradukado kaj redaktado kunlaboros homoj el diversaj landoj. Nun la ĉefa bezono estas tradukistoj kaj provlegantoj kiuj kapablas redoni la tre diverstemajn, klerajn artikolojn

en bona kaj flua lingvaĵo. Se vi regas Esperanton je nivelo C1 aŭ pli alte, se vi ŝatas interesan kaj defian traduklaboron, kaj se vi povas regule disponigi vian tempon por tia kunlaboro, bonvolu skribi rekte al la projekto-kunordiganto Trezoro Huang Yinbao: trezoro@qq.com.

(el *Gazetaraj Komunikoj* de UEA n-ro 684)